



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj  
Enlande: 3 pesetoj  
Provegzemplero: 1 resp.

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA



## LA GRAVECO DE NIA KONGRESO

Dudek-ses jarojn Kataluna Esperantista - Federacio batalas por la disvastigo de Esperanto en nia lando kaj dek-sep Kongresoj okazis en la daŭro de ĝia agado,

sed neniam nia movado havis antaŭ si la ŝancojn, kiujn prezentas la nunjara Kongreso de Manresa, kies honoran prezidantecon bonvolis akcepti la Konsilisto de Kulturo de la Kataluna Registaro, kiu promesis ĉeesti la Malferman Kunsidon kaj alparoli la katalunajn esperantistojn.

Se per si mem niaj Kongresoj havis ĉiam grandan gravecon en la kultura vivo de la urboj, kiuj akceptis ilin, eksterordinare multe pli granda estos la graveco de nia XVIII, kiun honoros reprezentanto de la registaro kaj per tio la famo de nia festo estos ne nur loka sed tutlanda kaj ĉiuj kulturaj medioj, vole-nevole, devos atenti pri la movado, kiu sukcesis altiri la subtenon de la Konsilisto de Kulturo.

Estus nepardoneble, se ni ne eltirus el la okazo la tutan profiton, kiun ĝi povas doni al nia enlanda movado. Niaj propa-

gandistoj havas antaŭ si belan perspektivon kaj la laboro ne povas halti. Diskonigu ĉie la Kongreson de Manresa kaj laŭte distrompetu la novaĵon, ke la plej alta reprezentanto de nia kulturo estas ĝia honora prezidanto kaj ke li partoprenos ĝin.

Sed la plej grava devo de ĉiu esperantisto estas ĉeesti la XVIII. Kio havas ĉiujn ŝancojn de la plej granda sukceso de nia multjara klopodado, fariĝos nia disfalo kaj tombo, se niaj kunbatalantoj, ĉiuj konsciaj esperantistoj senescepte, ĉu membroj de K. E. F., aŭ ne, ne ĉeestos la Kongreson. Ne temas pri sukceso aŭ malsukceso de K. E. F. sed pri la vivo mem de nia movado, kiu staras multe pli altre. Ni esperas, ke ĉiu fervorulo —feliĉe restas multaj ankoraŭ—ne haltos en la propagando de la XVIII kaj instigos la malvarmulojn partopreni la esperantistan feston. Precipe respondaj estas la grupestroj kaj niaj delegitoj, kies kunlaboro estas necesa por la sukceso. De ili ĉiuj dependas la tuta afero. Se ili sukcesos entuziasmigi la lokajn esperantistojn, se ili dediĉos sian tutan energion al la porkongresbatalo, la reprezentanto de nia registaro vidos antaŭ si grandan nombron da idealistoj venintaj el ĉiuj anguloj de nia lando kaj li konkludos, ke certe nia afero estas subteninda, sed se nur kelkaj dekoj respondos al niaj alvokoj, ni tiam fermos la pordon de pli vastaj agadkampoj kaj tiom da klopodoj, espero kaj iluzioj estos neniigitaj.

La estonteco de nia enlanda movado estas en viaj manoj. Pruvu unu fojon ankoraŭ, ke via entuziasmo ne malvarmiĝis, pruvu, ke vi sentas profunde la idealon kreitan de la genia Zamenhof kaj ke vi konstante batalas por la dua lingvo de ĉiuj homoj kaj de ĉiuj popoloj.

La XVIII vokas vin ĉiujn. Manresa atendas vin. Esperanto esperas, ke vi ĝuste komprenos la gravecon de la XVIII Kataluna Esperanto-Kongreso.

#### OFICIALA KONGRESPROGRAMO

Dimanĉon, la 31-an de majo.

Je la 10-a: Oficiala akcepto ĉe la Urbdomo, Malfermo de la Kongreso sub la prezido de la Honorinda Konsilisto de Kulturo de la Kataluna Registaro, Sro. Ventura Gassol, kiu faros la malferman paroladon, parolado de la prezidanto de K. E. F. kaj salutado de la delegitoj.

Je la 11,30: Vizito al la Arkivo kaj Muzeo de la Urbo.

Je la 12-a: Malfermo de Esperanto-Ekspozicio kaj Ekspozi-

cio de Akvareloj de nia samideano Jacint Comella el Vic en la Kongresejo (Grup escolar Renaixença).

Je la 13-a: Vizito al la sidejo de esp. grupo «Bela Espero».

Je la 15,30: Ekzamenoj en la Kongresejo. Oni bonvolu anonci sin antaŭe.

Je la 16-a: Labora Kunsido en la Kongresejo; raporto de la sekretario, de la kasisto, diskuto de prezentitaj proponoj, kaj tiel plu.

Je la 17,30: Festo de la XVII Internaciaj Floraj Ludoj en la Kazino de Manresa.

Je la 20-a: Oficiala Festeno en Hotelo St. Domènec. Bileto 12 ptoj. (Mendu antaŭe).

Je la 22-a: Koncerto de «Orfeó Manresà» kaj ĉambromuziko en la sidejo de «Orfeó», placo Fius i Palà.

Lundon, la 1-an de junio.

Je la 9-a: Vizito al la plej rimarkindaj lokoj de la urbo. Rendevuo en «Bela Espero».

Je la 11-30: Labora Kunsido en la Kongresejo.

Je la 13-a: Lunĉo en «Centre de Dependents», promenejo Pere III.

Je la 16-a: Ferma Kunsido en la Kongresejo.

Je la 17-a: Daŭrigo de la vizitoj.

Je la 19-a: Danco de «sardanoj» en placo de l'Om sub la aŭspicio de «Foment de la Sardana» de Manresa.

Je la 22-a: Projekcio de amatorfilmoj en «Centre Excursionista de la Comarca de Bages», festoĉambro de «Orfeó Manresà».

Mardon, la 2-an de junio.

Je la 8-a: Ekskurso al Súria kaj Cardona. Vizito al la salminejoj, kastelo, k. t. p. akcepto en la Urbdomo de Cardona. Bileto 3,50 ptoj. Kun tagmanĝo 11 ptoj.

Je la 18-a: Alveno al Manresa kaj adiaŭado.

### KONGRESAJ SCIIGOJ

Vojaĝo. — Estas rekomendinde, ke ĉiuj kongresanoj estu en Manresa antaŭ la 10-a por ĝeesti la Malferman Kunsidon kaj aŭskulti la paroladon de la Konsilisto de Kulturo de nia Registaro. Tial ke pro la diversaj vojaĝeblecoj la kongresanoj ne povos alveni kune, ni rekomendas ke tuj post la alveno oni turnu sin al la Akceptejo instalita en la

- sidejo de esperantista Grupo «Bela Espero», passeig de Pere III, n.º 22. De tie oni iros kune al la Urbdomo. Ĉiuokaze en la Akceptejo oni donos la necesajn informojn, se la alveno de Sro. Konsilisto devigos nin fari iun ŝanĝon.
- Kongresinsigno.** — En la Akceptejo ĉiu kongresano ricevos la kongresinsignon. Bonvolu porti ĝin konstante dum la kongresaj tagoj.
- Standardoj.** — Oni rekomendas, ke ĉiu grupo portu sian standardon. Pli ol iam ni devas pruvi antaŭ la manresa popolo kaj precipe al la Honora Prezidanto, la Konsilisto de Kulturo, kiom potenca estas nia movado.
- Salutado de delegitoj.** — La delegitoj, ĉe la Malferma Kunsido, post la parolado de la prezidanto, povos saluti la kongresanojn. Por tio estas necese, ke ĉiu delegito prezentu sian rajtigilon al la sekretario. Ĉiuj grupoj, ĉu membroj aŭ ne, povas sendi delegiton.
- Ekzamenoj.** — Bonvolu sin anonci kiel eble plej baldaŭ la samideanoj, kiuj volas sin prezenti al la ekzamenoj. Por tio oni turnu sin al nia sekretario. Oni devos pagi la kutiman sumon por la diplomoj de *kapableco* kaj de *profesoreco*.
- Ekspozicio.** — Helpu la organizon de la Esperanto-ekspozicio sendante materialon por ĝi al la O. K. Oni plej zorge atentos pri ĉiu ricevita prunto kaj ĉio estos ĝustatempe resendita.
- Festeno.** — La Oficiala Festeno okazos en Hotelo St. Domènec kaj ĉiu bileto kostos 12 ptojn. Estas nepre necese sin anonci antaŭe por ebligi la organizon. Se vi ne sendis ankoraŭ vian aliĝon, uzu la aliĝilon, kium ni sendas kun tiu ĉi numero.
- Ekskurso.** — Se vi intencas partopreni la belan ekskurson al Súria kaj Cardona, sendu tuj la kunsendatan aliĝilon. Vidu la prezojn en la Kongresprogramo.
- Hoteloj.** — Jen kelkaj interesaj informoj pri ili:
- Mundial, Promenejo Pere III, 16, tuttaga pensio 15 pesetoj.
- St. Domènec, Placo St. Domènec, tuttaga pensio 12-14 pesetoj. Mangoj je 6-8 ptoj.
- Eŭropa, strato Nou, 6, tuttaga pensio 10 ptoj. Mangoj je 5 ptoj.
- Centre, carretera de Vic, 9 i 11. Tuttaga pensio, 9-12 pesetoj. Mangoj je 4 ptoj.
- Peninsular, Placo Infants, tuttaga pensio 7 ptoj. Mangoj je 4 ptoj.

Perdiu. Promenejo Pere III, 4, tuttaga pensio 10-12 pesetoj. Mangoj je 5-6 ptoj.

Gastejo Massana. Str. Guimerà, 7. Mangoj tre malkaraj. Dormoĉambro, 1,50 ptoj.

Al la montritaj prezoj aldonu 10% escepte al tiuj de Europa. En Manresa estas multaj «bar»-oj, en kiuj oni ricevas mangon je tre malaltaj prezoj.

Vagonaroj. — Estas multaj vagonaroj inter Barcelona kaj Manresa. Ni donas liston de la rekomendindaj:

*Kompanio «Catalans» — Placo Hispanujo.*

<i>Forveturo de Barcelona</i>	<i>De Martorell</i>	<i>Alveno al Manresa</i>
6	7'08	8'24
8'25	9'14	10'21

<i>Forveturo de Manresa</i>	<i>De Martorell</i>	<i>Alveno al Barcelona</i>
18'28	19'39	20'30
* 19'41	20'56	21'45

\* Nur dum festotagoj. Tial oni ne povos uzi tiun ĉi vagonaron la 2-an de junio.

Prezo de la bileto, 3-a klaso, iro kaj reveno 5'20 ptoj. La bileto validos ĝis la lasta kongrestago.

*Kompanio de l'Nordo.*

*Forveturo de;*

<i>Barcelona</i>	<i>Sabadell</i>	<i>Terrassa</i>	<i>Alveno al Manresa</i>
* 7'30	7'59	8'13	8'45
8'30	8'57	9'06	9'35

*Forveturo de;*

<i>Manresa</i>	<i>Terrassa</i>	<i>Sabadell</i>	<i>Alveno al Barcelona</i>
19'30	20'05	20'14	20'45
20'30	21'05	21'14	21'45
22'15	22'53	23'04	23'30

\* Forveturas de Nordstacio kaj la ceteraj for- aŭ ĝisveturas Placon Katalunujo.

Prezo de la bileto triaklasa: ptoj. 8,70 ir-reveno. Speciala tarifo al grupoj de almenaŭ 10 personoj 6,90 ptoj.; de 25, 6,25 ptoj.; de 50, 5,85. La tarifon oni aplikas nur post interkonsento kun la Kompanio. Pliajn informojn ni volonte havigos. La montritaj prezoj rilatas nur Barcelona.

Kongreslibro. — Estas en preparo tre interesa Kon-

greslibro kaj ni esperas, ke oni povos ĝin publikigi! Tio dependas de la helpo de la anoncantoj kaj tial, ni ne povas diri la lastan vorton pri ĝi. La kongresanoj estos informataj pri tiu ĉi punkto dum la Malferma Kunsido.

**Membrokartoj.** — La membrokartoj de K. E. F. estas tiuj de U. E. A. surstampitaj per nia federacia stampilo. Ni petas, ke ĉiuj niaj membroj portu ĝin por eventuala neceso kontrolo ĉe la Laboraj Kunsidoj aŭ speciala favorprezo de la Kongreslibro. La membrokartoj sen la kupono de 1936, kiun ni donas kun la jarkvitanco, ne estas validaj.

**Poŝtpropagando.** — La poŝtofiĉejo de Manresa uzas poŝtstampilon kun la teksto «XVIII Kataluna Esperanto-Kongreso, 31-V, 1-2-VI-1936». Ni publike dankas sinjoron F. Soler Valls, kies influo ĉe altaj medioj ebligis rapidan sukceson de niaj klopodoj. Dum la kongrestagoj sendu poŝtkartojn al viaj korespondantoj kaj amikoj!

**Lastaj avertoj.** — Estu en Manresa antaŭ la 10-a. Sendu viajn aliĝojn por la Festeno kaj Ekskurso kiel eble plej baldaŭ.

## XVII INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

### Verdikto

#### ORDINARAJ TEMOJ

##### ORIGINALAJ TEKSTOJ

I. Originala versaĵo kantanta «Amon». Natura Floro al la verko nro. 73, «Familia Poemaro», devizita «Amo ĉiuspeca».

Unua mencio al la verko nro. 97, devizita «Universo». Dua mencio al la verko nro. 22, devizita «Tial: Hura!» Tria mencio al la verko nro. 110, devizita «Anna». Kvara mencio al la verko nro. 78, devizita «Nemo».

II. Originala ama verko en prozo. Premiita verko: nro. 13, «Kunigitaj por ĉiam», devizita «Paolo».

Mencio al la verko nro. 98, devizita «Orfadeno».

##### TRADUKITAJ TEKSTOJ

I. Traduko de la kataluna versaĵo «En la Cruilla», de la

aŭtoro Josep Carner. Premiita verko: nro. 1, devizita «Denove».

Unua mencio al la verko nro. 84, devizita «Aŭtuno». Dua mencio al la verko nro. 16, devizita «Renkontiĝo».

II. Traduko de la kataluna rakonto «Traspuament de Llum», de la sama antaŭe citita aŭtoro. Premiita verko: nro. 17, devizita «Arto, scienco kaj libero».

Mencio al la verko nro. 39, devizita «Rozo skarлата».

## EKSTERORDINARAJ TEMOJ

### DIFINITAJ TEMOJ

«Laŭdo al la kiso», fiksita temo de la premio VII. Premiita verko: nro. 9, devizita «Versaĵo kantanta amon».

Mencio al la verko nro. 63, devizita «Labore et constantia».

«Esperanto, la plej taŭga disvastigilo de kristana doktrino», fiksita temo de la premio X. Premiita verko: nro. 91, devizita «Seriozeco».

Mencio al la verko nro. 113, devizita «Amu unu la alian».

«Al la plej bela tradukita poemo», fiksita temo de la premio XIX. Premiita verko: nro. 3, devizita «Hesperis».

Mencio al la verko nro. 32, devizita «Vienano».

Verko priskribanta katalunan folkloran temon, fiksita temo de la premio XXII. Premiita verko: nro. 112, devizita «Vilaĝana moro».

Mencio al la verko nro. 111, devizita «L'ermito».

## LIBERVOLAJ TEMOJ

### ORIGINALAJ VERSAĴOJ

Premio XIV al la verko nro. 18, devizita «Mi mem». Mencio al la verko nro. 82, devizita «Verda gorgo».

Premio XI al la verko nro. 59, devizita «Purajn rimojn». Mencio al la verko nro. 5, devizita «Preterpasanto».

Premio XXI al la verko nro. 66, devizita «Laboristaj sonetoj». Mencio al la verko nro. 56, devizita «Homo restas homo, eĉ ne dezirante tion».

Premio XVI al la verko nro. 26-29, devizita «Amanto-Sopiranto». Mencioj al la verkoj nro. 65 devizita «Jaro en mezeŭropa montaro», kaj al nro. 7 devizita «Flandra esperantistino».

## TRADUKITAJ VERSAĴOJ

Premio IX al la verko nro. 20, devizita «Kantareto por esperanto-instruo al infanoj».

Premio XXV al la verko nro. 25, devizita «Dunedin». Mencio al la verko nro. 30, devizita «Roslino».

Premio XXIX al la verko nro. 36, devizita «Sopiranto». Mencio al la verko nro. 24, devizita «Batalo kaj amo».

Premio XXVI al la verko nro. 79, devizita «Kun verda stelo kaj ruĝa koro». Mencio al la verko nro. 6, devizita «Aminto».

Premio III al la verko nro. 31, devizita «Antikvaĵo». Mencio al la verko nro. 63, devizita «Labore et constancia».

Premio XIII al la verko nro. 49, devizita «Antaŭen».

## ORIGINALAJ PROZAĴOJ

Premio XV al la verko nro. 107, devizita «Marysia». Mencio al la verko nro. 54, devizita «Taskoj maldolĉaj, enuaj...»

Premio V al la verko nro. 12, devizita «Tezeo». Mencio al la verko nro. 45, devizita «Glis».

Premio XII al la verko nro. 35, devizita «Lernu obei». Mencio al la verko nro. 90, devizita «Pseŭdoscienco».

Premio IV al la verko nro. 80, devizita «Libera vivo».

Premio XVIII al la verko nro. 94, devizita «Certe». Mencio al la verko nro. 93, devizita «Stranga».

Premio XVII al la verko nro. 77, devizita «La ununura».

Premio VIII al la verko nro. 57, devizita «Justeco». Mencio al la verko nro. 92, devizita «Brava».

## TRADUKITAJ PROZAĴOJ

Premio XX al la verko nro. 34, devizita «Pro flandria Servanda». Mencio al la verko nro. 37, devizita «Mili».

Premio XXX al la verko nro. 109, devizita «Sezam malfermiĝu».

Premio XVII al la verko nro. 11, devizita «Ankoraŭ unu fojon».

Premio XXIV al la verko nro. 44, devizita «Top».

Premio XXIII al la verko nro. 104, devizita «Fraksen».

Premio VI al la verko nro. 74, devizita «Popola saĝo».

Premio I al la verko nro. 71, devizita «Manresa».

Premio XXVIII al la verko nro. 15, devizita «Reader of reade».

Premio II al la verko nro. 61, devizita «Por». Mencioj al la



verkoj: nro. 43, devizo «Fabelmondo pasinta»; nro. 85, devizo «Orfo kaj hundo»; kaj nro. 86, devizo «Grindel Falk».

La Jugantaro devis lasi ekster la konkurso la verkon nro. 106, devizita «Ora et labora», ĉar ĝia teksto estis skribita en malneto kaj per kraĵono. Ankaŭ ne povis konkursi unu manuskripto alveninta 12 tagojn post la datolimo.

*Barcelona, 3-an de majo de 1936.* Fred Pujulà, Prezidanto. — S. Alberich Jofrè, Joan Gili Norta, Samuel Roca i Rodó, Voĉdonantoj. — Eduard Capdevila, Sekretario.

FINA LISTO DE VERKOJ RICEVITAJ — Verko 44, devizo: «Top», 45, 46, 47, «Glis», 48, 49, 50, «Antaŭen». 51, «Monhelpo». 52, «Malnova fabel' pri mallnova okaz'». 53, «Du partojn sentas mi en la animo». 54 «Taskoj maldolĉaj, enuaj...». 55, «Mi songis ĉe la festen'tablo». 56, «Homo restas homo, eĉ ne dezirante tion». 57, «Justeco». 58, «Nordo». 59, «Purajn rimojn». 60, «36. Inter la nacioj». 61, «Por». 62, «Knabino kaj birdeto». 63, «Labore et constantia». 64, «Melankoliaj poemoj». 65, «Jaro en mezeŭropa montaro». 66, «Laboristaj sonetoj». 67, «Ne armilo, sed plumo». 68, «Kial ne?». 69, «La lana jaketo». 70, «Ne ekzistas honoro sen laboro». 71, «Manresa». 72, «Ok poemoj». 73, «Amo ĉiuspeca». 74, «Popola saĝo». 75, «Vindicamus hereditatem patrum nostrorum». 76, «Arto». 77, «La ununura». 78, «Nemo». 79, «Kun verda stelo kaj ruĝa koro». 80, «Vivi kaj lasi vivi». 81, «Dankon, do». 82, «Verda gorgo». 83, «Libroj». 84, «Aŭtuno». 85, «Orfo kaj hundo». 86, «Grindel falk». 87, «Grindel falk II». 88, «Blanka rozo». 89, «Serĉu virinon». 90, «Pseŭdoscienco». 91, «Seriozeco». 92, «Brava». 93, «Stranga». 94, «Certe». 95, «Post pluvo brilos la suno». 96, «Ankoraŭ paŝeto». 97, «Universo». 98, «Orfadeno». 99, «Maritxu edera». 100, «Ni vokas». 101, «Unu por ĉiuj, ĉiuj por uno». 102, «Erla». 103, «Benko en parko». 104, «Fraksen». 105, «Abcde». 106, «Ora et labora». 107, «Marysia». 108, «Maria ŝot». 109, «Sezam malfermiĝu». 110, «Anna». 111, «L'ermito». 112, «Vilaĝana moro». 113, «Amu unu la alian».

Ekster la konkurso restis manuskripto devizita «Ne malpli ol unuan fojon», ĉar ĝi atingis nin 12 tagojn post la datolimo fiksita por akcepto de manuskriptoj.

EDUARD CAPDEVILA, Sekretario.

## PRI NIA KONGRESURBO MANRESA

Dorlotita de rivero Cardener, kiu banas ĝian maldekstran flankon, Manresa, sur monteto, aperas antaŭ la okuloj de la vojaĝanto sanktoleita per ĉiuj gracioj de urboj kaj vilaĝoj, kiuj havas la ŝancon posedi riveron pli malpli akvoriĉan sed kiu ĉiam estas rido kantanta, kiu dolĉigas per siaj mildaj murmuretoj la monotonan bruon de la moderna maŝino, kiu tremas altirita de la progreso kaj de la noblaj homaj ambicioj.

Kaj Manresa estas tia kvazaŭ maŝino, kiu moviĝas senĉese serĉante disvastigon al ĝia progressa kresko ĉu en la artoj, industrio, agrikulturo kaj komerco, kiel pratempe ĝin faris ĝia antaŭirinto «Minorisa-Rubricata» de la romanoj, ĝuante ĉiujn rajtojn de sendependa urbo reganta sin per siaj leĝoj kaj kun rajto de ĝiaj civitanoj ĝui la honoroficojn de la imperio. La civila historio de Manresa estas brilega en la XIII kaj sekvantaj jarcentoj, kion atestas la multnombraj privilegioj, kiujn certigas la rimarkinda diplomata kodo titolita *Verda Libro*, kiu zorgas oni gardas en la Urba Arkivo. Tiuj privilegioj montras la fundamentojn de la progressa kresko, kiujn ni menciis, ĝis ili ĝin faris la dua urbo de Katalunujo.

Serĉante en la arta aspekto ni trovas en Manresa diversajn kaj tre rimarkindajn monumentojn, kiuj ja meritas mencion.

Unuavice staras inter tiuj ĝia Katedralo dediĉita al la Ĉieliro de Mario. Ĝi estas belega konstruaĵo, kiun oni ekstarigis en oktobro de 1328, kvankam nur 264 jarojn poste oni ĝin finistia, kia ni ĝin vidas hodiaŭ. Ĝi havas puran ogivan stilon kaj ĝian ĉefan navon subtenas dek-ok okflankaj pilastroj kun cirkonferenco de 4,51 m., diametro de 0,56 m. esceptante du, kiuj subtenas la sonorilturon, kiuj havas diametron de 0,83 m. La tuta amplekso de la preĝejo estas 42 m. larĝa, 75 m. longa kaj 35 m. alta.

El la antikva kanonikejo Sta. Agusteno, kiu estis romanika, oni konservas la pordon de eniro en la klaŭstron sed nur kun unu kolono en ĉiu flanko anstataŭ du, kiujn ĝi havis. Ankoraŭ oni povas admiri tie, tamen, delikatajn laboraĵojn kiel la malgrandegan frison sur la dentiklo, kiu kunigas la flankajn abakojn, kiu estas arta mirbelaĵo, kaj la abakojn de la samaj kapitejoj bele simbolantajn bibliajn epizodojn. La timpano de tiu ĉi pordo estas unu el la plej bonaj ekzempleroj, kiujn oni konas en nia lando.

Inter la artaj juveloj, kiujn oni povas admiri en la nuntempa


LA SCENEJO  
DE LA  
XVIII KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO



Ĝenerala vidaĵo



La Urbodomo




Instituto de d




Placo de l'Om






agrada instruo



La Kazino



Franciskana Monahinejo



Montserrat majeste elstaras sur la fono de la  
horizonto de Manresa

Katedralo de Manresa, staras unuavice la multvalora ogiva altaro, konstruita en 1394. La volbo kaj la muroj estas kovritaj per blanka stuko kun branĉaroj kaj aliaj desegnaĵoj elstarantaj, laŭ renesanca stilo. Tiuj ĉi estas tute oritaj kiel la absida ŝlosilo. En ĉiu apartaĵo oni vidas belajn ovoformajn medalionojn el blanka marmoro kaj de preskaŭ natura grandeco. La retablo de la kripto estas duoncirkla volveto, subtenata de sep kolonoj el ruĝa marmoro kun kapitejoj kaj sokloj oritaj; en la centro granda urno el ligno kun kristaloj kaj sur ĝi bildo de Sta. Agneso, el blanka marmoro kiel tiuj de Sta. Maŭrico kaj Sta. Fruktuoso kaj Diakonoj Auguri kaj Eulogi, kiuj estas ĉe la flankoj; ili ĉiuj estas rimarkindaj pro sia esprimo kaj labordelikateco. Ili estas rimarkinda specimeno de baroka gusto, kiu regis ĉe la fino de la XVIII jarcento, dum kiu estis konstruita la dirita retablo, laŭ la dato 1781, kiun oni legas ĉe la piedo de la nomita urno. Fermas la kripton, ĉe la fino de la ŝtupoj, arta krado el fero forĝita kun manĉizitaj ornamoj.

Citon meritas ankaŭ la bela romanika portalo de la monaĥejo de Sta. Klaro, kiu hodiaŭ estas parto de la preĝejo de la sama patronino.

Manresa, kiu, kiel ni diris, estis la «Minorisa» de la romanoj, konservas el tiu tempo sian faman Malnovan Ponton de kvin kuraĝaj arkadoj super Cardener. Konstruita, onidire, ĉirkaŭ ducent jaroj antaŭ nia tempokalkulo, ĝi estas ŝtona atestanto de diversaj generacioj, ĉiam firma, spite de la skuegoj de pereigaj akvo-fluegoj, malĝojmemoro de la urbo.

*El la kataluna trad.* SALJO

## ĈU KULPO AŬ SORTO?

(Fino)

Malrapide anonciĝis la naskiĝanta tago. En griza lumo ŝi ekdistingis konatajn domojn, la stratoj reakceptis sian longon kaj profundon kaj ĉio aspektis ne eldireble malgaje. Ankaŭ en ŝia animo tagiĝis: grize kaj malgaje. Revenis la kapablo senti kaj pensi. Profunde ŝi kompatis sin mem, sed tuj poste ŝi konsciiĝis pri sia terura akuzo. Ankoraŭ li estas savebla. Tiu ĉi penso redonis al ŝi sian energion. Necesas agi, agi tuj!

Post kelkaj minutoj ŝi jam staris antaŭ la junulo. Dankon!

al Dio, ŝi pensis forte spirante, li ankoraŭ deĵoras. Li komprenos kaj liberigos Aleĉjon.

—Kamarado, mia edzo estas senkulpa, mi ĵaluzis, pardonu, liberigu lin!

—Via edzo, kamaradino — kaj liaj okuloj glitis laŭ ŝia valorapulto — via edzo, sinjorino, estis antaŭ du horoj mortpafita.

—*Mort-pa-fita?*

—Jes, ne estis kaŭzo pridubi akuzon de *edzino*.

—Mort-pa-fita, mia Aleĉjo, mia dolĉa senkulpa Aleĉjo morta, mi mortigis lin...

Ŝia veado sufokiĝis en singulta ploro.

La antaŭtagmezon ŝi pasigis en la preĝejo. Milfoje ŝi rememorigis al si ilian unuan renkontiĝon. Estis la sama societo kiel hieraŭ. Ho kiel bela, kiel aminda li estis. Kaj ŝia animo avide dronis en la revoj de ilia vekiganta amo, en la feliĉa pasinteco por forgesi la teruron de l'nuno. Kaj ŝi trovis konsolon. La doloro ne plu pezis tiom kaj radio de nova espero eĉ ekĝermis sur la fundo de ŝia koro: la junulo mensogis, jes, li certe mensogis por timigi ŝin. Aleĉjo vivas kaj revenos, devas reveni. Ŝia animo alkroĉiĝis al tiu ĉi savesperero per ĉiuj siaj fortoj. Ŝia pulso energie ekbatis kaj ŝia sango febre ekskandis: li vivas, li revenos; li vivas, li revenos...

Ŝi eliris el la preĝejo. Estis tagmezo. Ne sciante kial, ŝi ekiris, komence iom heziteme, al la tombejo. La subkonscia forto pelis ŝin al tiu ĉi paca kaj sankta kampo. Ĉu paca kaj sankta? Jam de malproksime ŝi vidis dekmilojn da kadavroj amasigitaj je terura piramido. Proksimiĝante ŝi distingis iom post iom aretojn da kadavroj, homaj kadavroj, pli poste iliajn kapojn, kruojn kaj manojn. Flejparte ili estis nudaj, nur ĉifita ĉemizo aŭ kalsono kovris ilian nudecon. Infanoj kaj maljunuloj, viroj kaj virinoj, ĉio en naŭziga, terure ĥaosa interplektaĵo: la hara senkarna mano de griza maljunulo kuŝas sur la brusto de juna virino, kvazaŭ senhonta kadukulo manflatus la mamojn de publikulino... knabego, ne ankoraŭ junulo, montras sian nudan kaj malgrasan postajon kontraŭ la griza, plumbopeza ĉielo, cinika pozo, en kiu esenciĝis lia filozofio: alian respondon meritas nek la homo nek dio, nek vivo nek morto... kaj mil aliajn senhontajn kaj groteskajn grupojn kaj pozojn kreis la abunda fantazio de l'hazardo, la plej inventema reĝisoro: la «enterigistoj» ĵetis la kadavron sur la amason. Jen ĉio. Sed antaŭe ili senvestigas ĝin kaj vendas la veston sur la bazaro. Malkare kun tifa morto aldone. La kadavroj estis frostiĝintaj kvazaŭ osto, ilia koloro similis al mal-



nova eburo. Jen mano de juna virino en gips-bandaĝo minace streĉita kontraŭ la ĉielo. Jen viro kun pafvundo ĉe l'kolo. Jen knabineto en malpura ĉemizeto kaj en ties faldo longa, longega vico da frostiĝintaj pedikoj: miloj da pedikoj, unu apud la alia. Jen maljunulo kun ligna piedo. Ĉu invalido el la rus-japana milito? Ĉu invalido de laboro? Ne, lia barbo ne estas blanka, ĝi estas bruna. Estas nur neĝeroj, plum-molaj neĝeroj de l'pasinta nokto, kiuj kaptiĝis igante la barbon blanka. Pli malsupre estas la neĝo pli aĝa, la fundamenton de l'piramido kovras neĝo jam de aŭtuno... same flava kiel la kadavroj mem.

Anjuta malrapide ĉirkaŭiris la amason kaj atente rigardis ĉiun kadavron, unu post alia...: Aleĉjon ŝi ne trovis kaj febre varma sango martelis en ŝiaj tempioj: li vivas, li revenos. Alproksimiĝis du viroj, junulo-rugarmeano kaj mezaĝa policano.

—Bela heredaĵo, ĉu ne? — moke diris la juna soldato.

—Heredaĵo? De kiu?

—Nu de la malbenita Kolĉak. Eĉ siajn mortintojn li ne sukcesis prizorgi kaj volis zorgi pri vivantoj — diris la soldato ridante pri sia spritaĵo.

—Ne estu maljusta, kamarado. Neniu povos scii, ke la tifa epidemio forrabos dekoble pli da homoj ol estis aŭtune preparitaj tomboj. Kaj nun eĉ per dinamito vi ne sukcesos fari tombon. Sed kio okazos, kiam printempa suno ŝanĝos la kadavrojn putrantan amason. Ĥolero anstataŭos tifon.

—Militkaptita inĝeniero ellaboris kaj proponis planojn, laŭ kiuj estas brikfabrikoj ŝanĝotaj en kremaciejojn. Sed verŝajne oni surverŝos petrolon kaj bruligos ĉion. Ne pensu, ke tiu ĉi putranta ostamaso estas la sola en Siberio. Ĉe ĉiu urbo kaj urbeto troviĝas simila. Ne estas malfacile trovi ĝin: sufiĉas, se oni sekvas la grakantajn korvojn, ili estas la plej fidindaj gvidantoj. Jen rigardu, kiel la diablidoj avido okulumas de sur la arboj. Ĉu vi aŭdis pri Novo-Nikolajevsk? Ne? Jen kiel ili liberiĝis de siaj karaj mortintoj: ili metis ilin unu sur la alian kaj regule kiel ŝtipojn en vagonojn kaj 30 plenplenajn vagonojn ili sendis kiel helparmeon post Lia fuĝanta Generala Moŝto Kolĉak. Tamen ili ne povis savi lin; la loka soveto en Irkutsk mortpafis lin. De tiu tempo la Vagonaro de l'Morto promenveturas sur 6,000 kilometroj da reloj de Omsk ĝis Vladivostok tien kaj reen: neniu staciestro toleras ĝin en sia stacio pli longe ol nepre necese. Sed jen kio okazis. En malgranda stacio la oficistoj forŝtelis unu vagonon opiniantes, ke ĝi entenas botojn kaj vestojn, ha, ha, ha kaj de tiu tago

pendolas inter Omsk kaj Vladivostok nur 29 vagonoj. Ĉu ne brila ŝtel-majstraĵo?

—Jes, kaj pro tio devis veni la revolucio.

Anjuta finaŭskultis la babiladon de l'juna soldato kaj foriris. Lacega ŝi atingis ilian hejmon. Febro ardis sur ŝiaj vangoj. Ŝi ne kuraĝis eniri en la loĝejon, kiun ili antaŭ 24 horoj kune forlasis kiel feliĉa geedza paro. Kia ŝanĝo dum tiom malmultaj horoj. Ŝi kaŭriĝis sur la ŝtupo por iom ripozi kaj ŝirmi sin kontraŭ la penetrema malvarmo. Ŝiaj tempioj ritme martelis. Antaŭ ŝiaj okuloj ruĝa nebulo koncentriĝis en grandaj rondoj, kiuj malgrandiĝante ondis ĝis meza flava punkto, kiu fine malaperis kaj restis nur ruĝa nebulo, kiu koncentriĝis en grandaj rondoj, kiuj... Kun mira atento ŝi komence sekvis ĉi tiun koloran ludon de l'ruĝa nebulo kaj kreiganta rondo ĝis la malaperanta flava punkto. Tiu ĉi regula malaperado komencis timigi ŝin. Ŝi provis haltigi la ondantajn rondojn. Vane. Ĉu infanaj fingretoj povas haltigi moviĝantan ombbron? Angoro plenigis ŝian koron. Sed fine tamen sukcesis la miraklo, la ritma martelado ĉesis, la ruĝa nebulo heliĝis kaj ŝi ekvidis lin... Aleĉjon! Ondo da varma ĝojo trakuris ŝian korpon.

—Aleĉjo, ora, dolĉa Aleĉjo... pardonu! Mi ja sciis, ke vi vivas kaj revenos... mia karulo... Feliĉe ridetante ŝi fermis la okulojn.

Matene oni trovis ŝin frostiĝinta.

THEODOR KILIAN

Premiita en Ripoll.

## 28.<sup>a</sup> UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Wien I., Neue Burg, Aŭstrio

*Kongres-karavanoj.* La preparoj por bona frekventigo de la 28-a vikle progresas, kiel ni sciigas el la eksterlandaj raportoj. Jen la listo de Esperantaj karavanoj al la Viena Kongreso: Brita Esperantista Asocio (Cecil C. Goldsmith, London) — Bulgara Esperantista Asocio (Kotov, Ruse). — Estona Esperanto-Asocio (s-ino Dresen, Tallinn). — «La Estonto estas Nia» (Reisbureau L. E. E. N., Amsterdam). — Pola Esperanta Delegitaro (Kutscher, Krakow). — Societo por Propagando de Esperanto en Francujo (Petit, Rosny-s/Bois). Sve-

da Turista Komisiono Esperanta (E. Malmgren, Stockholm). — Svisa Esperanto-Asocio (Dr. Spielmann, Bern). — S-ro. J. Telling kun s-ro. Damen de Katolika Esperanto-organizo en Nederlando (Rotterdam).

Loka Kongresa Komitato ĵus eldonis 4-paĝan detalan kongresprogramon, kiun ĝi por propagandaj celoj en dezirata kvanto dissendis al la karavanestroj, Esperanto-organizoj kaj ceteraj interesuloj.

«El la Kongresurbo». — La profesora kolegio de la Teknika Altlernejo en Wien ĵus nomis s-ron d-ron Sirk lektoro de Esperanto por la dirita Instituto. S-ro Sirk ankoraŭ en tiu ĉi monato komencos prelegojn pri Esperanto, diskonigitajn per radio kaj per gazetaro, unuavice por la studentoj de la «Tekniko» kaj duavice por eksteruloj-gastoj, interesigantaj pri nia lingvo.

«La teatraĵo de la 28-a» estas la ĉarma opereto «La blanka ĉevaleto», muziko de Ralf Benatzky, teksto de Hans Müller, kantoj de Robert Tillberg, Esperanta traduko de red. Nikolao Hovorka. La preparoj por prezentado de tiu fama kaj reprezentacia verko de l'aŭstria bonhumoro kaj serena gajeco, kiu estis jam en tutmondo multe aplaudata kaj filmigita, vige progresas. Pri tiu ĉi opereto kaj ĝia enhavo ni skribos detale en nia sekva komuniko kaj aldonos al tio el ĝi kelkajn karakterizajn, eltiraĵojn.

«Malfaciloj por elvojaĝo», ĉu ili koncernas vizajn aŭ valutajn aferojn, estu sciigataj al L. K. K., kiu — se nur eble — penos en ĉiu konkreta kazo pri ilia forigo, resp. mildigo. Ekzemple koncerne la sciigitajn «limigojn por elvojaĝo el Nederlando», L. K. K. ricevis de l'tiea aŭstria ambasadoro la informon, ke la malfaciligoj nun «ne validas» kaj kredeble ankoraŭ en la plej proksima tempo «ne ekvalidos».

LOKA KONGRESA KOMITATO

Wien, 25, 4 36.

## BIBLIOGRAFIO

### *Faldprospektoj.*

Viena Foiro eldonis okpaĝan ilustritan propagandilon. Laŭ ĝi Wien nuntempe estas unu el la plej malmultekostaj grandurboj en la mondo.

Japanujo, eldonita de Japana Fervoja Ministrejo kun 20 pĝ. kaj 24 ravaj fotoj, tre lerte kompilita kaj interesa precipe por okcidentanoj, kiuj havas nur supraĵan ideon pri la malproksima Japanujo. Oni povas ricevi senpage la eldonon post peto al Direkcio por Turismo (Kokusai Kankoo-Kjoku), Japana Fervoja Ministrejo, Tokio.

Gorssglockner Transalpa ŝoseo estas la nomo de tre bela gvidprospekto, kiu prezentas la faman ŝoseon interkomunikantan Salzburg kaj Karintio. Belegaj fotoj antaŭvidigas kiom ĝuos la partoprenontoj de la vojaĝo «Tra Aŭstrujo» de la XXVIII. Tradukis kort. kons. Hugo Steiner.

Gvidfolio por Vojaĝantoj en Manĉoŭkŭo estas la unua gvidilo publikigita en esp. de The South Manchuria Railway Company. Se vi volas ricevi la ilustritan prospekton petu ĝin de Sud-Manĉuria Fervoja Ko. (S. M. R.) — Dairen, Sud-Manĉurio.

Wien. — Faldprospekto priskribanta la mirbelan urbon, kies monumentoj, palacoj, salonoj, muziko, virinoj, k. t. p. gajnis la tutan mondon.

Budapest. — La metropolo de la Sanigbanejoj. Kvarpaĝa propagandilo diskoniganta la plej famajn hungarajn kuracbanejojn.

Aŭstrio. — 24 paĝa gvidlibro pri la konata ĉarma lando. Ĉiu paĝo prezentas al vi ravan foton kaj nur senhavulo restos hejme okaze de la XXVIII en Wien, kiu donas la eblecon viziti je malalta prezo la veran paradizon. La tradukon faris laŭ la kutima kompetenteco s-ro kortega konsilisto Hugo Steiner.

Wien kaj Niederösterreich. — Ankoraŭ nova propagandilo pri la lando de la XXVIII. Ĝi enhavas ĉiaspecajn informojn por la turistoj. Kiel kutime belegaj fotoj elokvente parolas pri la enviinda lando pri kiu ĉiu homo volonte dirus «mi ja ne bedaŭrus, se tiu lando estus mia patrujo».

Adreslibro de la komercaj reprezentantoj en Bukaresto, eldonita de la Komerca kaj Industria Ĉambro tiea en lingvoj rumana, franca, germana, angla kaj esperanta.

Historio pri la skismo en la laborista esperanto-movado. — Dokumentaro, kiu montras la kaŭzojn kaj respondecojn kaj preparas la bazon por unueca agado. 20

pĝ. 13×19, prezo 2 fr. Eldonis S. A. T. 67, Avenue Gambetta, Paris, 20.

La Plenumkomitato de S. A. T. objekte priskribas la naskigon, evoluon, batalon kaj atakojn, kiuj okazis en la vicoj de la klasbatalaj esperantistoj. Certe ne ĉiu konsentos kun la kompilintoj, tamen ĉiu legos kun intereso pri tiu ĉi grava movado de la esperanto-mondo.

Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, eldonita de Esp. Centra Librejo, 11 Rue de Sèvres, Paris 6, 1935. Prezo: 2 fr.

Ĝia enhavo konsistas el Statutoj, Interna Regularo, Nomaro de la Lingvo-komitatanoj, k. t. p.

Astronomio. — Kompilis kaj eldonis Joĉasien, P. O. Kesto 274, Shanghai, ĉinujo. 24 pĝ. 17 1/2×9 1/2. 1 respond-kupono.

Per facila stilo la aŭtoro prezentas al ni kelkajn trafajn klarigojn pri la suno, steloj, planedoj, satelitoj, kometoj, kaj tiel plu. Kvankam ĉiu mezinstruita homo konas la elementan enhavon de la broŝuro, ĉiam oni relegas kun plezuro kelkajn precizajn ciferojn pri la grandiozeco de la universo.

SALJO

## ENLANDA MOVADO

Vic. — Pro la foresto de nia pioniro, s-no Jacint Comella, nia movado trankvile dormis dum kelka tempo kaj nur dank'al la reveno de nia altŝatata kunbatalanto nia afero reprenis sian vivon.

Roses. — La loka grupo «Brava Marbordo» havas la sekvantajn fraŭlinojn en la listo de novaj membroj: Lola Romanjach, Margarida Berta, Demètria Marés, Roseta Margalef, Roseta Lagresa kaj Maria Marés. La jenaj junuloj ankaŭ aliĝis al la grupo: Josep Guitart, Pere Mari, Joaquim Ortensi, Josep Godo kaj Domènec Bordes. Niaj amikoj Josep Martí kaj Josep Roig gvidas kurseton por la nomitaj novaj gekunbatalantoj. Nia fervora samideano Manuel Cortada transloĝiĝis al Figueres pro studaj postuloj. Espereble li daŭrigos en la nova loko la batalon por Esperanto.

Barcelona. — Okaze de la inaŭguro de monumento al

Pi i Margall multaj esperantistoj partoprenis kun standardoj grandan manifestacion. Estas sciata, ke la granda defendinto de la federaciaj principoj diversokaze defendis la ideon de lingvo internacia per fervoraj artikoloj.

—La 27-an de aprilo komenciĝis novaj kursoj en la sidejo de A. E. Espero. La unuagrada okazas sub la gvido de sno. F. Fuster kaj la duagrada sub tiu de R. Gisbert kaj S. Alberic. La kursoj estas multnombre ĉeestataj.

—La 15-an de aprilo la malnova grupo «Barcelona Stelo» malfermis novan kurson kun sukceso.

—Nia kara Sekretario, s-no Rafael Gisbert, estis elektita ĉefdelegito por Katalunujo kaj Balearaj Insuloj de Marista Ligo Esperantista, kaj nia kunbatalanto, s-no Josep Garganta delegito de Barcelona. La Marista Ligo povas esti fiera, ke ĝi elektis niajn plej fervorajn samideanojn. Gratulon al la novaj delegitoj.

Terrassa. — Okaze de la inaŭguracio de la nova sidejo de Esperantista Grupo «Lumon», ni havis eksterordinare brilan feston la 9-an de majo. Ĉirkaŭ 125 geesperantistoj partoprenis la feston, dum kiu ni havis lunĉon. Ĉe la prezida tablo sidiĝis kun la prezidanto de la grupo, nia pioniro Sro. Sebastia Chaler, la prezidanto de K. E. F. Sro. Alberic, la vicprezidanto Sro. Gili, Sro. Dalmau, Sro. Solà, kaj aliaj malnovaj kunbatalantoj. Post la lunĉo paroladis la prezidanto de Lumon, la reprezentantoj de K. E. F. kaj multaj aliaj samideanoj, kiuj laŭdis la multjaran fervoran bataladon de la grupo. La festo finiĝis je tre malfrua horo kaj dum ĝi regis granda entuziasmo.

La 12-an de majo komenciĝis nova kurso kun partopreno de multaj novaj adeptoj.

#### *Eksterlandaj samideanoj nin vizitas.*

Ni ĝuis la agrablan viziton de Sro. Grenkamp-Kornfeld, la lerta ĉefredaktoro de «Nia Gazeto», kapabla kaj fluparolanta esperantisto, kaj elstara kunlaborinto de la «Plena Vortaro de Esperanto» kaj aŭtoro de kelkaj libroj pruvantaj plene lian eklektitan kulturon.

Lia malkaŝa karaktero kaj sincera malfermiteco, ambaŭ tre ofte renkonteblaj en niaj sudaj landoj, tuj prenis kontakton kun ni, kaj ni havis la plezuron konstati en kiom da aferoj rilatantaj nian movadon ni devis konsenti kaj samopiniu. Li ja vivis kaj vivas la movadon de proksime, korpe al korpe — ni

povus diri—, kaj enblovas en ĝin sian meritan fervorecon kaj junecan entuziasmon.

Dum lia kelktaga restado en Barcelona, en la lasta monato aprilo, li havis okazon viziti du el la ĉi-tieaj grupoj plej viglaj kaj unu el ili ĝuste hazarde oni vizitis en tago kiam okazis por-esperanta propagandifesto. Li profitis tiun okazon por diri kelkajn vortojn al la Ĝeestantaro, interpretita de nia prezidanto Sro. Alberich, kaj estis varme aplaŭdata de la neesperantista publiko lin aŭskultinta.

### *Foradiaŭo al Sro. P. von Prabucki.*

Nia estimata amiko, pola samideano P. v. Prabucki, restinta dum naŭ monatoj inter ni, forveturis bicikle el Barcelona la 6-an de pasinta aprilo, kun la intenco komenci sian delonge intencitan vojaĝon tra la mondo kun la celo propagandi Esperanton. Li biciklos, komence, al la sudo de Hispanujo, nordafriko, Portugalujo, kaj revenos al Barcelona tra la nordo de Hispanujo, kie li planos detale sian entreprenotan mondvojaĝon.

En la momento kiam ni skribas tiujn ĉi liniojn ni havas leteron de li, kaj li, kiu jam atingis nordafrikan urbon Tetuán, ĝoje sciigas nin pri la unua sukceso de lia vojaĝo. Post kelkaj tagoj (dua semajno de majo) li komencos kurson de Esperanto en Tetuán kaj poste simile en Ceuta. Ankaŭ oni aranĝis en ambaŭ urboj prelegojn por-esperantajn ĉe kulturaj societoj kaj ĉe radiostacioj. Ni kore gratulu pro la sukcesoj jam atingitaj al la fervora pola samideano.

Ni devas tamen fini tiun ĉi raporteton, dankante al la firmo Sanromà el Barcelona, reprezentanto de la konata biciklofabriko «Orbea», la malavaran helpon donitan al Sro. Prabucki per unu el la cititaj bicikloj «Orbea».

## NIAJ MORTINTOJ

### **Artur Domènech, mortis!**

Nia kara amiko, nia senlaca kataluna pioniro, nia merita poeto ne plu estas inter ni! Kelkaj minutoj sufiĉis por estingi lian vivon, en subita koratako. Sendolore li mortis; sendolore estis lia malsano, lian korpon atakinta antaŭ kelkaj jaroj. Sed doloran penetrantan frapon sentis nia koro ĉe l' sciigo pri lia malapero.

Juna, tro frue lin rabis de ni la morto. Kvindek ok-jara apenaŭ li estis, kaj 26 jaroj de konstanta sindediĉo kronas lian esperantistan agadon. Kiu ne memoras ankoraŭ lian subitan aperon ĉe niaj vicoj en la jaro 1914? Tri monatojn li bezonis por ellerni Esperanton. Li, la iama profesoro de latina lingvo, aperis subite en nia movado dum la Kongreso de K. E. F. okazinta la jaron 1914 en Sant Feliu de Guíxols; kaj ne kiel simpla kongresano li ĉeestis nian ĉeefeston esperantistan, sed kiel poeto gajninta la Naturan Floron li aperis, ĉe l' brako de la tiama Reĝino de la Floraj Ludoj.

Depost tiam li estis plene altirita al nia agitanta idealo. Kursoj kaj kursoj estis lia konstanta okupatiĝo. Kiom da perfektaj esperantistoj eliris el liaj kursgvidadoj. Ni povus diri, ke kelkaj miloj da personoj ĝuis liajn gramatikajn klarigadojn, en la daŭro de lia longtempa batalado, ĉe grupoj «Barcelona Stelo», «Nova Sento» kaj dum la radiodissendoj de «Ràdio Barcelona».

Ne malpli valora estis lia tasko ĉe la literatura kampo. Kvarfoje li atingis la Naturan Floron ĉe niaj konataj Internaciaj Floraj Ludoj, krom ankaŭ aliaj poeziaj premioj. Ankaŭ kelkaj tradukoj el la kataluna lingvo pruvas pri lia bonstila, fundamenta esperanto. Vera poeto, fervora literaturamanto, senlaca pioniro estis nia plorata Domènech.

La 30-an de pasinta aprilo ni akompanis lin al la lasta ripozo, sentinte fortan ĉagrenon, antaŭsentantan ke io vivinta dekarniĝis el la korpo de nia movado. Ni ne trovos vortojn esprimantajn nian sinceran kondolencon al la funebranta familio, sed nia amiko Jaume Grau Casas, lia bofilo, bone interpretos niajn embarasitajn vortojn pro emocio, kaj bonvolos ilin transdoni al la senkonsolaj vidvino kaj gefiloj.

EDCA

### **Korekto**

En nia lasta numero, en la artikolo «Pri la lernolibro «Curs Complet d'Esperanto», aperis la jena teksto: «Mi oftege konsultis la esperantan-katalunan vortaron de Frederic Pujulà, hodiaŭ ne tute bonan.»

Tio, kompreneble, estas eraro. Ĝi devis teksti: «Mi oftege konsultis la esperantan-katalunan vortaron de Frederic Pujulà, hodiaŭ ne tute kompletan, sed ĉiutempe tute bonan».